

Ĉu ni kapablos instrui pli kaj pli bone?

João José Santos

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

8

N
r
o

3
4
6

S
e
p

2
0
1
3

Enkonduko

En la lasta numero de BE (345), la artikolo *Stumblado en la esperanto-lernado* (paĝoj 6–8) skizis kelkajn kaŭzojn de la malsukceso en la lernado de esperanto. La nuna artikolo proponas gvidliniojn por plibonigi la lernproceson.

Por surpaŝi la vojon al tiu celo, oni devas ĝin pavimi per responso, laboremo, studemo, profesieco kaj esperanto-utiligo.

1. Esperanto estas facile lernebla lingvo.

Facileco de esperanto-lernado estas kompara koncepto. Ne eblas aserti, ke esperanto estas facile aŭ malfacile lernebla en absoluto, sen komparo. Ankaŭ ne sencas kompari la lernfacilecon de esperanto kun la facileco trinki oranĝosukon. Kompreneble, se oni deziras juste kaj serioze konkludi pri la lernfacileco de esperanto, oni devas kompari ĝian lernproceson kun tiu de fremdaj lingvoj.

Kelkaj esperantistoj, kiuj nur scipovas sian denaskan lingvon kaj esperanton, konkludas, ke la internacian lingvon oni ne lernas tiom facile, kiom oni diras. Ili ne havas eblecon kompari. Nur tiuj, kiuj lernis aliajn lingvojn rajtas konkludi, ĉu la esperanto-lernado efektiviĝis pli aŭ malpli facile ol la lernado de aliaj lingvoj.

La pioniroj de esperanto kapablis paroli diversajn lingvojn, kaj ili alvenis al la konkludo, ke la lernado de esperanto efektiviĝis laŭ maniero multe pli facila, en malpli da tempo, ol la lernado de aliaj lingvoj. Ankaŭ nuntempe multaj esperantistoj lernis diversajn lingvojn. Tiuj povas agnoski, ke la lernado de la latina, la portugala, la germana, la ĉina, la araba aŭ eĉ la angla bezonis multe pli da tempo, klopodo, energio kaj mono ol la lernado de esperanto.

Se la lernado de esperanto ne estus tiel sukcesa kaj facila, esperantistoj estus mensoguloj, kiuj dezirus altiri homojn al lingvo, kiu ne estus taŭga rimedo por la internacia komunikado.

Logike, asertante, ke esperanto ne estas facile lernebla lingvo, esperantistoj konfuzas la homojn, kiuj reage certe pensas, ke ili preferas la anglan aŭ

alian lingvo-alternativon, se esperanto ne estas facila. Do, tiu eraro estiĝas pafo sur niajn propagandajn klopodojn.

Mispensante, ke esperanto estas malfacila, la lernantoj perdas memestimon en la lernproceson. Lernantoj bezonas kuraĝon por studi ion novan, ne senkuraĝigajn asertojn, precipe se ili eĉ estas falsaj.

Oni komprenu, ke la tuta proceso uzi kulturan kodan sistemon por esprimi sentojn, por komuniki informojn kaj por disvolvi rezonadojn, per parolo kaj per skribo, eĉ preterpasas la homan komprenon, ĉar tio envolas sociajn, psikajn, biologiajn, anatomiajn, lingvajn kaj aliajn lertaĵojn treege kompleksajn. Tiu tuta sistemo estas tre malfacile komprenebla. Tamen, eĉ infano kvar-jaraĝa ĝin uzas. Esperanto ne demetas kompleksecon al tiu proceso, kiu restas en la kampo de la lingvo-uzkapablo, sed sin donas kiel instrumenton pli facile uzeblan ol la aliaj lingvoj. Kial? Ĉar dekomence ĝi estis adekvate konstruita kun la celo faciligi la rilatojn inter la popoloj. Esperanto enhavas prononcan sistemon en kiu ĉiu litero prononciĝas ĉiam sammaniere, esperanto enhavas treege regulan gramatikon, esperanto enhavas rigoran sistemon de vortfarado, tre logikan, kiu evitas abundecon de radikoj. Komparu tian facilecon kun la malfacileco de via denaska lingvo, kaj ne diru plu, ke esperanto estas malfacila. Tio estas absolute falsa ideo, kiu fole subrampis inter la esperanto-uzantoj.

2. Esperanto-instruisto devas ne nur eklerni esperanton, sed ellerni ĝin.

Kion vi dirus, se afabla homo sen studoj pri anglalingva filologio, lingviko, literaturo kaj didaktiko proponus al vi:



joaojosesantos@gmail.com
www.lakaravelo.net

“Mi estas ŝuriparisto. Neniam mi studis en fakultato, sed mi parolas en la angla lingvo, ĉar ĝi estas mia denaska lingvo. Do, mi povas instrui al vi la anglan. Por tio, mi formos klason, mi prenos libron kaj mi instruos per ĝi.”

Certe vi dankus la bonvolemon de tiu homo, transdonus al li viajn ŝuojn por riparado, sed vi serĉus profesion anglalingvan instruiston por lerni ĉi tiun lingvon.

Kial do la aferoj devas okazi alimaniere en esperanto?

Tiu ŝuriparisto havas la avantaĝon, ke li parolas la anglan denaske, sed eĉ tiel neniu ŝatus lerni la anglan de li. Kion diri pri la esperanto-instruantoj, kiuj apenaŭ parolas esperanton?

Kvankam esperanto estas facile lernebla lingvo, la ago uzi lingvon por esprimi ideojn estas kompleksa afero, kaj do eĉ por instrui facilan lingvon, la instruisto devas esti profesiulo.

Pri la instruado de esperanto devas okupiĝi tre kompetentaj esperantistoj, kiuj devas esti lingvo-instruistoj, aŭ almenaŭ instruistoj pri aliaj fakoj. Ĉi-lastaj almenaŭ havas sperton gvidi lernantojn en lernproceso, kaj do ili povas adapti sin al instruado de ĉi tiu lingvo.

Oni devas agnoski, ke kelkaj esperantistoj, pro siaj diligento kaj studemo, estiĝis bonegaj esperanto-instruistoj, kvankam ili neniam instruis ion ajn antaŭe. Krome, ekzistas situacioj, precipe en ekonomie malfavorataj landoj, en kiuj oni devas kapti la bonvolemon de memlernanto, kiu helpas aliajn en la esperanto-lernado. Tamen, tiu ne estas la dezirata situacio. Tiuj homoj tiom amas esperanton, kaj tiel sentas, ke ĝi estas facila, ke ili kuraĝe entreprenas la instruadon de la lingvo. Bedaŭrinde, multaj el ili restas en komenca nivelo, kaj do ne estiĝas bonaj instruistoj.

Se vi ne estas instruisto, sed vi instruas esperanton, ne ĉesu fari tion, sed vi mem lernu pli kaj pli. Legu librojn kaj revuojn, konsultu bonajn vortarojn kaj gramatikojn, agordu vian esperanto-prononcon kun tiu de esperantistoj internacie agnoskataj kiel bonaj esperanto-parolantoj, kaj do ne ĉesu ellerni (= ĝisfunde lerni) la lingvon. Tamen, se vi lernis esperanton, tuj komencante instrui ĝin, sed vi mem restis en nivelo de komencanto, ne dezirante profundigi viajn esperanto-konojn, vi estas misinstruanta viajn lernantojn, kaj via laboro

por esperanto certe estas fuŝa kaj aĉa. Rezignu, bonvole. Dediĉiĝu al aliaj agadoj en via esperanto-asocio, lasante la esperanto-instruadon al studema homo, preferinde al instruisto.

Instruisto devas esti forta apogilo por siaj lernantoj. Lingvo-instruisto devas tre flue paroli la lingvon instruatan, kapabli konsili librojn, revuojn kaj muzikojn, klarigi pri sinonimoj, pri sintaksaj strukturoj, kompari ilin kun la denaska lingvo sen involvi sin kaj la lernantojn en la kompleksecon de la denaska lingvo. Nu, li devas esti instru-ISTO, tio estas profesiulo pri instruado. Ĉu vi estas tia instruisto? Ne!? Do, estiĝu tia! Ĉu vi ne estas sufiĉe laborema por tio? Do, propagandu esperanton, helpu aliajn en la asocio, sed ne instru esperanton.

3. La esperanto-kursoj estas pagendaj.

Profesiuloj pagigas siajn servojn, ĉie en la mondo. Instruistoj ne laboras senpage, escepte de kelkaj specialaj situacioj. Kial do la esperanto-instruisto kutime laboras senpage? Multaj esperantistoj supozas, ke nur senpage la lernantoj venas en esperanto-klason. Tiu pensmaniero produktas precize la malan rezulton. Ne pagante la kurson, la lernanto ricevas aŭtomatan psikan mesaĝon, ke esperanto ne estas serioza afero, ĉar ĝi ne estas traktata profesie. Tiel, la lernanto eble ne ĉeestos ĉiujn lecionojn, ĉar finfine li perdos nenion. Ja en alia kurso, denove senpage, la sama sklavo, la instruanto aŭ la instruisto, tie estos por servi lin. Tiu lernanto alkiutimiĝos, ke ĉio en esperanto estas senpage. Li ne aĉetos librojn nek aliajn esperantovarojn, preferante preni ĉion senpage el la reto. Tiel eldonejoj ne sin disvolvas kaj verkistoj ne povas plentempe labori por esperanto.

Oni komprenas, ke kelkaj homoj lernus esperanton, se ili povus pagi ties kurson. Kiam tia situacio prezentiga, oni private parolu kun tiuj homoj. La aliaj lernantoj ne devas scii, ke ili estas nepagipovaj lernantoj. Oni instru al ili senpage, sed samtempe oni komprenigu ilin, ke la instruisto tion faros, nur se lia konduto en la kurso estos serioza, akurata, studema kaj entute responsema. Same li devas postuli al ĉiuj lernantoj.

Ne eblas labori kun homoj malakurataj, malĉeestemaj, malseriozaj, malresponsemaj. Niaj instruistoj donacas sian vivtempon kaj energion al

lernantoj kaj al esperanto. Ofte tiu tempo estas ŝtelita al la instruistaj familianoj. Do, ankaŭ pro tio, oni respektu ilian laboron. Eĉ kiam oni pagas al ili, plejofte oni ne pagas la sufiĉon. Tiu pago ofte ne sufiĉas por la benzino kaj por aliaj elspezoj, kiujn la instruistoj havas por iri al la klaso.

Kelkaj esperantistoj rigardas esperanton kiel religion, kiel sanktan aferon, kaj do ili deziras tute donaci sin al la esperanta laboro. Ili sentas maldignecon pagigante la esperantaj servojn. Tiuj bonintencaj homoj profunde eraras. Per sia bonvolemo, ili kreas kutimaĉojn en la movado, kaj prezentas la esperantistojn al la cetera mondo kiel strangajn misiistojn. Esperanto povas doni fortan kontribuon por la homa paco kaj por la interfratiĝo inter la homoj. Tamen, ĝi estas lingvo, ne religio, ne sekto. Akceptu, ke aliaj eĉ eble ne vidas la internan ideon, rigardante esperanton nur kiel genian inventaĵon. Ĉu homarama instruisto pri filozofio ne edukas, dum sia vivo, centojn da lernantoj, tiel kontribuante por la homara paco? Tamen, li plenrajte ricevas monon por sia laboro. Same devas okazi pri esperanto.

Neniu bezonas esperanton por atingi bonan postenon, nek por sia vivpriskribo, do kompreneble la kursoprezoj ne povas esti altaj. En modernaj socioj ofte la homoj pagas iom por kursoj pri arto, kreiva verkado, informadiko, fluidoterapio, lingvoj, meblorekonstruado kaj por multaj aliaj studobjektoj. Esperanto estas vidata kiel unu el tiuj nebezonaĵoj, kiujn multaj homoj ŝatas lerni. Do, proponu la prezon de la esperanto-kursoj laŭ tiu de aliaj nedevegaj fakoj.

4. La proceso instrui kaj lerni esperanton devas esti serioza kaj delikata.

Ja la laboro en klasĉambro devas esti agrabla, senĝena, senstreĉa. Ĝi devas feliĉigi kaj la instruiston kaj la lernantojn. Tamen, tio ne signifas, ke ĝi estu senresponsa.

Nepre instruisto devas prepari siajn lecionojn, eĉ se li estas sperta pri la fako. Instruisto, per sia konduto, devas doni ekzemplon pri akurateco kaj ĉeesteco je la lecionoj, postulante la saman dignecon al siaj lernantoj. Krome, klasĉambro ne estas loko, kie oni manĝas, nek kie oni parolas per la poŝtelefono.

Instruisto devas havi instrucelojn en ĉiu leciono. Li ne iras al la klasĉambro por provi instrui ion,

sed por efektive instrui al la lernantoj, kion li preparis hejme. Lernantoj sentas la responsemon de la instruisto, kaj kutime agas same serioze, laŭ la rigardata ekzemplo.

Ĉiu leciono devas komenciĝi per rapida reprenado de konoj akiritaj en la lasta leciono. La ago instrui ne estas elbuŝigado de scioj, sed didaktika dialektiko inter la instruisto kaj ĉiu klasano. Kompetenta lingvo-instruisto kaptas la lernstaton de ĉiu lernanto, konsciante kion ĉiu scias, kaj kiujn malfacilaĵojn ĉiu havas. En la momento instrui ion novan, la instruisto kapablas antaŭvidi kiujn problemojn ĉiu lernanto havos por kapti la novajn lernitaĵojn, kaj jam havas la rimedojn por ĉiu el siaj lernantoj. Ĉu vi opinias, ke tio estas tre malfacila kaj laboriga? Do, vi ne estas instruisto, kaj do vi ne devas instrui.

5. La lernantoj estiĝos esperantistoj se ili trovos aplikeblecon por esperanto.

Lernado kaj instruado ĉiam estas laborigaj agadoj, eĉ por facila lingvo kiel esperanto. Ĝenerale homoj lernas ion kun iu celo, kaj tiel la celo motivigas al la laboro. Eksciu do, kial ĉiu el viaj lernantoj volas lerni esperanton. Nur tiel, vi povas helpi ilin atingi tiujn celojn, kaj tiel viaj lernantoj restos ligitaj al esperanto, eĉ post la fino de la kurso.

Kiam la lernantoj atingos la gradon A.1.2. de KER, helpu ilin rilatiĝi kun fremdlingvaj esperantistoj. Tiel ili ekhavas novajn amikojn, kun kiuj nur en esperanto ili povos rilatiĝi. Se viaj lernantoj ŝatas legi, enkonduku ilin en esperantajn librojn kaj revuojn. Se ili estas vojaĝemaj, provu organizi vojaĝon kun ili por rilatiĝi kun komunumo de esperantistoj, se eble en alia lando.

6. La prononco de la instruisto devas esti modela.

Ĝenerale la lernantoj imitas la prononcon de la instruisto. Sekvu la parolmanieron de internacie prestiĝaj esperantistoj. Aŭskultu kantojn en esperanto, kaj aprezu, kiel la kantistoj klare prononcas la vokalojn. Evitu paroli esperanton laŭ la akĉento de via denaska lingvo.

Ĉu vi havas dubojn pri la plej bona maniero prononci la esperanto-vortojn? Do, vi ankoraŭ ne povas esti instruisto de esperanto, ĉar ĉi tiuj ne havas tiajn bazajn dubojn.

Sekvu la prononcan modelon de Ivo Lapenna, kies prelegoj impresas pro la retorika organizo,

pro la pleneco de enhavo kaj pro lia belega sekunda prononco. Fakte, eĉ tio ne estus necesa, se ne ekzistus tiom da lernolibroj kun tiom da eraroj pri tiu afero. Ĉi tie oni diru nur, ke en esperanto oni parolas per klaraj vokaloj, bele malfermitaj, sen nazaligoj.

7. Atentu pri lerniloj, konstituo de la klaso kaj metodoj.

Uzu lernilojn kun profesia kvalito. Ne baku viajn proprajn lernilojn. Vi povas konstrui ekzercarojn kaj aliajn helplernilojn, sed la klaso devas sekvi lernolibron didaktike konstruitan. Uzante bonan lernolibron, vi ne perdiĝos en la proceso gvidi viajn lernantojn.

Atentu pri la troa heterogeneco de via klaso. Junuloj kaj adoltoj ne lernas sammaniere. Homo lerninta jam tri fremdajn lingvojn akiras esperanton multe pli rapide ol homo lerninta nur la denaskan lingvon. Estas preferinde havi pli da laboro en du klasoj, ol instrui al ununura klaso, kies lernantoj bezonas du instrumetodojn.

Ĝenerale junuloj kaj studemuloj lernas rapide per konversacio, filmoj, muzikoj kaj moderna lernolibro. Adoltoj, kaj precipe maljunuloj, bezonas konstante skribi ĉiun lernitaĵon, ĉar ili ne plu fidasis memoron. Krome, ĉi-lastaj kutime postulas, ke la metodo iru laŭ siaj kutimoj kaj kapricoj. Se vi, leganto, havas sperton instrui lingvojn al ambaŭ grupoj, kaj junuloj kaj adoltoj, certe vi jam havis tiajn problemojn. Do, dividante la klason en du klasojn, vi uzos pli da instrutempo, sed vi povos disvolvi multe pli bonan laboron.

Kiu metodo estas pli bona? Ĉu la gramatika? Ĉu la konversacia? Ĉu alia? La plej bona metodo estas tiu, kiu donas bonajn fruktojn. Do, sen dogmoj, adaptu la metodon al vi mem kaj al via klaso. Metodoj estas iloj, ne celoj, do elektu tiun, kiu ŝajnas al vi plej adekvata. Tamen, ne forgesu, ke lingvolernanto devas (a) lerni gramatikon, (b) aŭskulti kaj paroli, (c) legi kaj skribi, (ĉ) uzi la lingvon. Uzu vian metodon, sed ne forgesu ĉi tiujn bazajn sed tre gravajn postulojn en lingvolernado.

8. Instruisto kaj lernanto devas batali kontraŭ fuŝemo.

Finfine, oni devas uzi esperanton pli kaj pli, sed ne fuŝe.

Ne sufiĉas uzi esperanton, nepras ĝin uzi kompetente, laŭ la gramatiko de Zamenhof, kun ele-

ganteco, kun varieco, kun kapablo paroli pri nuancoj, kun flueco kapablanta profundigi ideojn kaj sentojn.

Neesperantistoj ne povos kompreni, kion vi diras en esperanto, sed facile ili kaptos, ĉu vi balbutas, ĉu via esperanto-nivelo ne estas alta, ĉu vi ne havas fluecon en la uzo de la lingvo.

Se esperanto estas, kiel vivece asertas la esperantistoj, la plej adekvata lingvo por la internacia interkomunikado, do ĉiu esperantisto havas la devon sin prepari por montri al la mondo, ke ĝi estas evoluinta lingvo.

Konklude

Pensu do pri ĉi tiuj gvidlinioj por plibonigi la lernadon de esperanto:

1. *Esperanto estas facile lernebla lingvo.*
2. *Esperanto-instruisto devas ne nur eklerni esperanton, sed ellerni ĝin.*
3. *La esperanto-kursoj estas pagendaj.*
4. *La proceso instrui kaj lerni esperanton devas esti serioza kaj delikata.*
5. *La lernantoj estiĝos esperantistoj, se ili trovas aplikeblecon por esperanto.*
6. *La prononco de la instruisto devas esti modela.*
7. *Atentu pri lerniloj, konstituo de la klaso kaj metodoj.*
8. *Instruisto kaj lernantoj devas batali kontraŭ fuŝemo.*

La rekomendata vojo por plibonigo de la esperanto-lernado laborigas, responsigas kaj profesiigas la instruistojn kaj ĝenerale la esperantistojn. Tamen, certe oni ne esperas miraklan solvon.

